



Kroniko

Jaro 2013



Pola Esperanto-Asocio
Filo Gliwice

Vintra renkontiĝo en Slovakio Vintra renkontiĝo en Slovakio Vintra renkontiĝo en Slovakio

Ekde la 3a ĝis la 6a de januaro 2013 okazis tradicia vintra renkontiĝo nomata "Poludnica" en Liptovský Jan.

En la kunveno partoprenis ĉirkaŭ 40 esperantistoj el kelkaj landoj. El glivice'a klubo ankaŭ estis kelkaj samideanoj.

La aranĝo komenciĝis jaŭde posttagmeze per foriro al la najbara urbo Liptovský Mikuláš. Tie okazis vernisaĵo de la ekspozicio pri Poludnica, kie la organizantoj regalis nin per vino, kafo kaj kuketoj.

Dum la renkontiĝo okazis du ekskursoj. Vendrede ni ekskursis al Ziarška valo. Ni iris ĉirkaŭ 10 kilometrojn en vere vintra vetero - neĝis kaj blovis. Trairante 5 kilometrojn ni alvenis en montaran kabanon. Tie ni sidis ĉe kameneto, babilis, trinkis kaj manĝis. Post mallonga ripozo ni denove iris tra la valo ĝis la "Ursa minejo", kiun ni vizitis kun ĉiĉerono. Sabate okazis ekskurso al monto-pinto "Poludnica". Ĉiu partoprenanto kunportis ŝtonon, kiun lasis sur la monto-pinto. Post la ekskurso okazis banado kaj saŭnado.

Krome, ĉiutage okazadis interesaj prelegoj, interalie: "97-a UK en Hanojo", "Tra Vjetnamio", "Naples, urbo en Usono", "Albanio", "Kanado", "Burundo", kaj "Ĉinio". Estis ankaŭ distra vespero kun dancado kaj komuna kantado.

La kunveno estis tre interesa kaj bone organizita. Ni tre gratulas kaj kore dankas al organizantoj.

Raportis Natalia Grochocka



Nova Prezidanto de Pola Esperanto-Asocio

La 19an de januaro 2013 en Varsovio okazis Ekstraordinara Kunveno de Delegitoj de PEA, dum kiu oni elektis novan estraron de Pola Esperanto-Asocio. La prezidanto de nova estraro de PEA estis elektita **Stanisław Mandrak** - ĝis nuna prezidanto PEA-filio Gliwice. Li tenis jam tiun altan postenon antaŭ kelkaj jaroj en la jaroj 1997 - 2007. Ni gratulas al li!

Novjara renkontiĝo de esperantistoj



La 26an de januaro 2013 okazis nia tradicia novjara renkontiĝo de esperantistoj.

La kunveno komenciĝis je la horo 11.00 en sidejo de nia klubo. En ĝi partoprenis ĉirkaŭ 30 esperantistoj el proksimaj urboj: Gliwice, Zabrze, Katowice, Tychy, Sosnowiec, Mikołów kaj Jaworzno. Ni gastigis ankaŭ eksterlandanojn - el Ĉeĥio kaj Norvegio.

Prezidanto de nia filio Stanisław Mandrak salutis partoprenantojn kaj deziris al ĉiuj ĉion bonan en Nova Jaro 2013, kaj ni ĉiuj deziris al si reciproke feliĉan Novan Jaron.

Poste parolis niaj gastoj.

Amiko de gliwice'a klubo Jerzy Walaszek, kiu estas prezidanto de pola societo Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE-PL), rakontis pri agado de la societo. Li ankaŭ parolis pri sia laboro por esperanta literaturo, ĉar li ĵus finis kaj eldonis "Katalogon de Esperanta Literaturo". Li dediĉis al tiu laboro ĉirkaŭ 6 jarojn.

La gasto el Norvegio salutis ĉiujn kaj rakontis iomete pri sia lando kaj pri si mem.

Nia amiko el Ĉeĥio estas redaktoro de ostrava esperanta retradio "Verda stacio". Li

prelegis pri historio de ĉeĥoslovaka kaj ĉeĥa esperanta radio. Li ankaŭ registris fragmentojn de nia kunveno, kiujn vi povas aŭskulti en la paĝo: www.verdastacio.eu.

Poste ni komune kantis kristnaskajn kantojn, babilis, trinkis kafon kaj manĝis bongustajn kukojn.

Novjara renkontiĝo estis tre agrabla kun familia etoso. **La organizantoj invitas ĉiujn venontjare.**

Raportis Krystyna Grochocka





Kursoj pri Esperanto en Gliwice



Ĉe la Universitato de la Tria Aĝo kaj samtempe rilate al nia Gliwice'a Esperanto-Asocio de du jaroj okazas la kursoj pri la lingvo esperanto.

Ĉijare estas jam du kursoj: por la komencantoj kaj por la progresantoj.

Pasintjare kelkaj personoj partoprenis esperantan aranĝon en Szczawno-Zdrój, kaj ĉijare pli nombra grupo intencas veturi al Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, kie denove okazos ĉiujara renkontiĝo. Tie ili ne nur ĝuos esperantan etoson, sed ankaŭ ili havos eblecon partopreni interesan programon, kaj multe plibonigi lingvo-konon.

La kursoj pri esperanto okazas dufoje en ĉiu semajno - lunde kaj vendrede en la horoj 16.00 - 18.00.

Se estas personoj kiuj volus aŭskulti kiel sonas esperanta lingvo - ni invitas ilin viziti nin!

Danuta Źelińska

La 35a Jubilea Ĉebalta Esperantista Printempo



Estimataj Gesinjoroj!

Proksimiĝas nova, somera periodo. Ĉiuj jam planas novan libertempon. Ankaŭ ni, esperantistoj planas sian liberan tempon en somero. Multe el ni memoras siajn pasintjarajn printempojn, eble iu el vi estis pasintjare en Mielno. **Kaj jam pluan fojon gliwice'aj esperantistoj planas inviti Vin por komuna ripozado en Mielno inter 11 kaj 22 de junio 2013 (12 tagojn).** Estos granda plezuro, se Vi akceptos nian inviton kaj venos Mielnon por 35a ĈEP. Programo de ripozado grandparte dependas de

Viaj proponoj, de tio kion vi volas al ni prezenti. Ni planas distraĵojn, kursojn, komunan kantadon kaj dancadon, prelegojn kaj sunbruniĝon ĉe marbordo. Al tiu invito ni aldonas aliĝilon kaj aliajn informojn ligitajn kun la 35a ĈEP. Se tiu informo aktuale ne interesos Vin bonvolu transdoni ĝin al Viaj proksimuloj, konatuloj aŭ gekolegoj.

Kun esperanta saluto nome de organizantoj de la 35a Ĉebalta Esperantista Printempo

Stanisław Mandrak



Semajno de Internacia Amikeco

Semajno de Internacia Amikeco estas iniciato disvolvita en la Esperanto-komunumo, kaj festata ĉiujare dum la lasta plena semajno de februaro. **La Semajno unuafoje okazis en la jaro 1969.** La ideo estis lanĉita en 1968 de Erik Carlén, sveda aktivulo kaj plurjara vicprezidanto de UEA, kiu celis doni la okazon al esperantistoj tra la mondo organiziĝi por plifortigi la reciprokajn kontaktojn kaj senton.

Emblemo de la festo estas du interpretiĝantaj manoj sub la kvinpinta stelo kaj super la surskribo "Amikeco trans limoj". Ĉiu estas rajtigita uzi tiun emblemon, sed nur en la fiksita formo, senŝanĝe. Oni ne rajtas misuzi ĝin, ekz. por aliaj celoj. En antaŭaj jaroj la festo estis okazo por interŝanĝi t.n. amikkartojn, librojn, ĉokoladskatolojn, florojn ktp. Nuntempe la ideo reviviĝas kaj UEA instigas esperantistojn festi la Semajnon, ankaŭ uzante interreton.

Laŭ Vikipedio

Brazila vizito de nia prezidanto

En aprilo du membroj de nia e-klubo: prezidanto Stanislaw Mandrak kaj nia juna brazila kolego Marlon Ribeiro flugis al naskiĝlando de Marlon. Li de pli ol unu jaro loĝas kaj laboras en Gliwice. Ĉar lia fratino edziniĝis en tiu tempo, niaj anoj estis invititaj por tiu ceremonio. Por nia prezidanto okazis ebleco viziti la unuan fojon tiun foran kaj belegan ĉefurbon de tiu lando. Niaj klubanoj vizitis la centron de la ĉefurbo kun la modernaj konstruaĵoj, ĝuis la belecon konstruaĵo de parlamento kaj nacian bibliotekon. Vizitis unu el la plej modernaj en la mondo katedraloj, kiun "gardas" ĉe enirejo kvar apostoloj. Moderna konstruaĵo de prezidenta palaco de "juna ĉefurbo" estas nekomparebla kun aliaj palacoj de la regantoj en la mondo. "Juna" ĉefurbo kompare kun aliaj ĉefurboj en Eŭropo, ĉar venontjare, la ĉefurbo de Brazilo celebros sian nur 53-an jariĝon. Invito al Taguatinga Esperanto Klubo kaj rakonto pri nia pola esperanta movado elvokis inter pli ol 30 personoj grandan intereson. Renkontiĝo kun lokaj esperantistoj estis granda kaj kortuŝa ĝojo. Oni povis konstati, ke en tiu malproksima de Pollando lando Esperanto bone vivas kaj funkcias. Komuna tagmanĝo inter esperantistoj, partopreno en interesaj kursoj gvidataj de s-ro Josias Barboza, vizito en la sidejo de Brazila Esperanto Ligo montris al mi, ke homoj interesiĝas pri nia lingvo. Kelkhora vizito en la interesa esperantista loko gvidata de kelkdek jaroj de gesinjoroj Grattapaglia estis por ni neforgesebla travivaĵo. De multaj jaroj mi volis viziti tiun "paradizon" - Bona Espero. Korojn kiujn dediĉis Ursula kaj Giuseppe al junaj brazilanoj, ilia bonega laboro kaj perfekta edukado estis por mi kortuŝinda. Mi mem povis konvinkiĝi kian laboron ili faras por estonteco de tiu juna generacio. Kiam Ursula klarigis, ke dum tiuj jaroj ili edukis pli ol 600 gejunulojn kaj infanojn kaj multe el ili jam okupas diversajn gravajn en Brazilo postenojn mi konstatis, ke esperantistoj el la tuta mondo devus subtelni ilian laboron. Kortuŝaj momentoj laŭ Ursula kaj Giuseppe estas kiam dum diversaj festaj renkontiĝoj venas al Bona Espero, al siaj "geonkloj", familianoj kun pli ol 150 "genepoj". Multaj ekzotikaj fruktoj, zorgo pri legomoj, propra ĝardeno, kristala akvo, akceptebla bona por ni eŭropanoj temperaturo povas konvinki nin ke, ni estas en vera paradizo. Paradizo kiun konstruis kaj pri kiu zorgas esperantistoj. Partopreno en la geedziĝa ceremonio de fratino de mia amiko, kiu estis enu el la ĉefaj celoj de mia vizito en Brazilo estis kortuŝa kaj interesa por mi travivaĵo. Interesa des pli, ke mi la unuan fojon vidis tiun subĉielan ceremonion en alia, en pentokosta eklezio. Ĉiuj momentoj de mia vizito postlasis en mia memoro neforgeseblajn travivaĵojn. Travivaĵoj kiuj inspiras min por pensi denove viziti tiun belegan, kvankam foran landon.

Travis kaj priskribis Stanislaw Mandrak



Ĉantorio 2013

Tradicio de renkontiĝoj sur la pinto Ĉantorio inter polaj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj estas longdaŭra. La unua renkontiĝo okazis jam en la jaro 1925. Skribanta la artikolon aŭtoro nenion scias pri tiuj unuaj renkontiĝoj ĉar li naskiĝis jam post la dua mondmilito. La nunjara renkontiĝo okazis dimanĉe la 16-an de junio 2013. Tradicio kaŭzas ke la renkontiĝo okazas ĉiam dum la tria dimanĉo de junio. El nia glivice'a e-klubo partoprenis ĉijare nur unu persono. Pro diversaj kaŭzoj aliaj ne povis veni. Inter kaŭzoj mi menciuj sufiĉe ne bonaj trafikeblecoj. Por veni sur la pinto je la 10a horo mi devis komenci vojaĝon jam je la 5a horo matene. Alia kaŭzo estis samtempa aranĝo en Mielno. Multaj miaj geklubanoj volis partopreni tiun aranĝon. Post trajna vojaĝo de mia urbo Zabrze al Ustroń Polana mi eniris stacidomon de telfero. Per la telfero post kelkminuta vojaĝo mi preskaŭ atingis pinton. Sufiĉis nur duonhora grimrado kaj je la 10a horo mi venis al loko de niaj renkontiĝoj, al ĉeĥa turista domo. Vetero estis bela kaj mi kun surprizo rimarkis ke mi estis sur la pinto unua esperantisto. Sur la pinto regis silento ĉar malmultaj turistoj estis tie ĉi. Mi elektis tablon antaŭ la turista domo kaj trinkante bongustan ĉeĥan bieron mi atendis alvenon de aliaj esperantistoj. Post duonhoro venis slovakino kun siaj du filoj. Renkontiĝo komenciĝis. Poste venis ĉeĥoj el Ostrava. Kaj lastaj estis poloj. Tiu ĉi foje venis pli ol 20 esperantistoj. Kiel neniam ni ĉiuj sidis ĉe unu tablo kaj komune babilis. Poloj kaj ĉeĥoj kunprenis esperantajn flagojn. Pro tio ni estis bone videblaj kaj nia kunveno estis bona reklamo por Esperanto. Partoprenantoj faris fotojn kaj ne nur. Redaktoro de Verda Stacio, esperanta retradio intervjuis nin kaj ankaŭ li faris filmon, kiun vi povas rigardi sube. Dum la renkontiĝo regis vera esperanta etoso kvankam neniu zorgis pri programo. Ni manĝis, trinkis, kantis kaj babilis. Mi persone preparolis kelkajn aferojn kun gekolegoj el Ĉeĥio. Rezulto de tio estas iuj planoj kiuj se ili estos realigitaj tiam estos kaŭzo por skribi alian artikolon. Fine de la renkontiĝo mi ekscis ke inter partoprenantoj estis ĉeĥino kiu, kiel mi, legas esperantajn librojn laŭ Esperanto-sumoo. Mi ĝojis pro la renkonto. Tempo rapide pasis kaj venis tempo por adiaŭi kaj reveni hejmen. Ĉirkaŭ la 15a horo mi adiaŭis kaj per la sama vojo revenis hejmen. Vojaĝo reen ne estis bona. Trajno estis plenplena sed mi tion eltenis feliĉe. En memoro restis nur bona kaj bela renkontiĝo de samideanoj el tri najbaraj landoj.

Raportis Aleksander Zdechlik

Itala Kongreso

Ekde la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2013 okazadis la 80a Itala Kongreso de Esperanto en Sanremo-Kastelaro, en la Regiono Liguria. La kongresa temo estis: "Sin kompreni por sin respekti". En la kongreso partoprenis 225 esperantistoj el la tuta mondo (34 landoj). Pollandon reprezentis 12 esperantistoj. La kongresejo situis en la vasta parko, kie troviĝis du naĝejoj kaj multaj sportaj instalaĵoj. En la kongresejo estis sep salonoj kaj riĉa libroservo. La programo enhavis: seminariojn, kursojn de Esperanto je diversaj niveloj, kurson de la tradicia abako - Sorobano, prelegojn, teatraĵojn kaj koncertojn. Dum la tuta semajno okazis kelkaj tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj. Estis ankaŭ programo por junuloj kaj infanoj. Mi dankas al la organizantoj pro la grandioza kongreso, kiu estis tre bone organizita. Ĝi restos por ĉiam en mia memoro.

Salutas - Natalia Grochocka



GRUPE 2013



Kiel en la pasintaj jaroj en Gliwice ni organizis aranĝon GRUPE-17. Nia aranĝo okazis de **vendreda posttagmezo la 8-an ĝis lundo la 11-an de novembro** en la sama loko kiel dum la pasintaj jaroj. Malfermo de la aranĝo okazis **sabate la 9-an de novembro je la 10.30 horo**. Adreso: *Gliwice, str. Jagiellońska 21*
En la programo okazis: prelegojn, teatraĵojn, komunan kantadon,

vizitadon en fama Glivice'a Radiostacio kaj aliajn interesajn programerojn.
Ni vizitis la eksan karbominejon "Guido" en najbara urbo Zabrze (pagata aparte).

